

# La NASKa Fasko

Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe la Universitato William PEACE

mardon, la 28-an de Junio, 2016 • numero unu

## Hodiaŭ • Today

★ 5:45 pm: Vespermanĝo / Dinner

Kunvenu en la unua nivelo de nia loĝejo; Hoĉjo gvidos nin al la manĝejo. / Meet in the common area on the first floor of our residence hall. Hoss will show you the way to the cafeteria.



★ 7:00 pm: Interkonatiĝa vespero / "Meet-and-greet" evening  
Unua etaĝo de nia loĝejo  
First floor of our residence hall

## Morgaŭ • Tomorrow

★ 7:30 – 8:15 am

Matenmanĝo / Breakfast  
Belk Dining Hall (#13 sur la mapo)

★ 8:30 – 12:15 pm

Grupa orientiĝo kaj kursoj / Group orientation and courses  
Flowe Building, ĉambro #110

★ 7:00 pm: Filmvespero en Flowe

## Verku por la Fasko!

(aŭ fotu, anoncu, leteru...)



La Fasko estas forumo por ekzerci vin en verkado kaj dividi viajn verkojn kun aliaj lernantoj. Sendu poemojn, ŝercojn, bildstriojn, plendojn al la redaktoro (aŭ eĉ am-leterojn al li), artikolojn pri viaj ŝatokupoj... ktp.

Portu viajn kontribuojn al la redak-tejo en ĉambro 112, aŭ (eĉ pli bone) sendu ilin al <nask.esperanto@gmail.com>.

Kaj... se vi estas en la supera kurso, bonvolu helpi lernantojn en aliaj niveloj verki aŭ poluri siajn verkojn.

## Bonvenon al NASK!

Hoss FIROOZNA ("Hoĉjo") estas la help-instruisto de NASK. Li redaktas la ĵurnalon kaj organizas la eksterkursajn programojn. Bonvolu kontakti lin (en ĉambro 112) se vi volas kontribui al la Fasko aŭ prezenti eksterkursan programon.

Bonvenon! Morgaŭ matene okazos grupa kunsido por prezenti viajn instruistojn kaj la instruprogramon. Poste sekvos la unuaj lecionoj. (Vidu la hortabelon maldekstre.) Intertempe: ripozu, elpaku viajn valizojn, kaj renkontu viajn samĉambranojn.

Ĉi-vespere je la 7-a horo okazos tute neformala "interkonatiĝa vespero". Venu al la unua etaĝo de nia loĝejo, Finley Hall, kaj renkontu viajn instruistojn kaj aliajn najbarojn. Kaj nepre ne timu: la kursoj ne oficiale komenciĝos ĝis morgaŭ, do krokodilado estas permesata!


Jen kelkaj aliaj gravaj informoj:

- La horoj de la manĝejo (Belk Dining Hall) estas:  
7:30 – 8:15 am: matenmanĝo  
12:30 – 1:15 pm: tagmanĝo  
5:45 – 6:30 pm: vespermanĝo
- En la tria etaĝo de nia loĝejo, fine de la koridoro, estas eta kuirejo kun mikro-onda forno, fridujo, ktp.
- En la unua kaj dua etaĝoj estas vesto-lavejo, kie vi povas senpage lavi kaj sekigi vestaĵojn. Sur tablo en la dua etaĝo ni lasis por vi botelon de leŝivo.
- Rimarku, ke la pordo de via ĉambro ne aŭtomate ŝlosiĝas kiam vi foriras, eĉ se vi jam premis la butonon sur la tenilo por ŝlosi ĝin de interne. Por ŝlosi ĝin de ekstere, nepre uzu vian ŝlosilon.

Finfine: se vi bezonas ajnan helpon dum NASK, bonvolu kontakti al Hoss en ĉambro 112, al Liĉjo MILLER en ĉambro 110, aŭ al Ellen EDDY en ĉambro 107.

Welcome! Tomorrow morning we'll have a group meeting to present your instructors and an overview of the program. Classes will follow. (See the schedule at left.) In the meantime, relax, unpack your suitcase, and meet your roommates.

This evening at 7 o'clock there'll be a very informal get-together. Come to the first floor of Finley, our residence hall, and meet your instructors and other neighbors. And there's no need to worry: classes don't officially start until tomorrow, so *krokodilado* is allowed!



Hoĉjo kaj Bruno, lia kolombo-amiko. (Bruno estas maldekstre.)

Some other important information:


- The hours for the cafeteria (Belk Dining Hall) are:  
7:30 – 8:15 am: breakfast  
12:30 – 1:15 pm: lunch  
5:45 – 6:30 pm: dinner
- On the third floor, at the end of the hallway, you'll find a small kitchen with a microwave oven, a refrigerator, etc.
- On the first and second floors there's a laundry room where you can wash your clothes for free. On the second floor we'll leave a bottle of detergent on the table for you.
- Note that your door will not automatically lock when you exit your room, even if you've pushed the button to lock it from the inside. To lock it from the outside, you must use your key.

Finally: If you need any help during NASK, feel free to contact either Hoss in room 112, Lee Miller in room 110, or Ellen Eddy in room 107.

# Mapo de la universitato

## Notoj

- La loĝejo por ĉiuj lernantoj kaj instruistoj estas *Finley Hall*, numero 2 sur la mapo.
- Lecionoj estas en *Flowe* (n-ro 9).
- Ĉiuj manĝoj okazos en la konstruaĵo *Belk Dining Hall* (n-ro 13). La manĝejo estas en la kelo (subtera etaĝo). Sekvu la ŝtuparon malsupren.



## Konstruaĵoj

- 2** **Finley Hall**  
(nia loĝejo)
- 9** **Flowe Building**  
(klasĉambroj)
- 13** **Belk Dining Hall**  
(manĝejo)